



## INSTRUISTA TREJNADO – UNUJARA KURSO

en la kunlaboro de la Interlingvistikaj Studoj de UAM, ILEI kaj Edukado.net

La Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando) kaj ILEI denove kune organizas unujaran **instruistan trejnadon**, kiu disponigas la bazajn konojn necesajn por instruado de esperanto kaj trejnos la partoprenantojn pri metodiko.

La kursaro necesigas partoprenon dufoje en la surloka intensa semajna sesio (la unua 14-20 sept. 2013, la dua 01-07 feb. 2014) kaj intertempan hejman laboradon, retan konsultiĝon kun la kursgvidantoj kaj pretigon de laboraĵo pri metodika temo, kies prezento kun la fina ekzameno okazos en septembro 2014. Sukcesintoj ricevos ILEI-diplomon pri instruista trejnado.

**Kondiĉoj:** bona lingvoscio (min. B2, atestilo pri esperanto-ekzameno estas bonvena) kaj baza kono de esperanta kulturo, krome finita mezgrada lernado (tipo de abiturienta ekzameno).

**Partoprenkotizo:** A-landoj: 300 EUR, B-landoj 130 EUR por unu semestro. ILEI-UEA ofertas stipendiojn. Informo kaj aliĝo ĝis la 10a de aŭg.: [interlin@amu.edu.pl](mailto:interlin@amu.edu.pl)  
<http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html>

### El la Programo

**Lingvopedagogio** (Katalin Kováts, Zsófia Kóródy, Ilona Koutny):

- Bazaj faktoroj de lingvopedagogio (instrumetodoj, instrupocezo, evoluigo de kapabloj, taksado, lingva interfero, ktp.)
- Esperanta metodiko (instruado de elparolo, gramatiko, vortoprovizo kaj kulturo, planado de lecionoj kaj kursoj, ktp.)
- Instruhelpiloj (de instruista kofro tra eldonaĵoj, filmoj ĝis retkursoj)

**Esperanta kulturo** (Tomasz Chmielik, István Ertl, Aleksander Korĵenkov, Ilona Koutny):

- Plej gravaj eventoj de la historio de esperanto
- Ĉefaj periodoj kaj verkistoj de e-literaturo
- Tiklaj punktoj de e-gramatiko

**Lingva trejnado** (per testoj)

**Donaco:** partopreno en la aktualaj kursoj de la Interlingvistikaj Studoj (i.a. de Humphrey Tonkin pri e-movado).